



PENSEO

N-ro 394

Aŭg. / 2024

**Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 35-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



*Bonan
Esperanto-Tagon!*

Li havis belan verdan tason,
Per kiu verdan teon trinkis,
Per la skribilo, ankaŭ verda
Apud la tablo ion skribis.

Pentraĵo bela apud lito
Dometo verda, verda kampo
Kaj kiel stel' lumigis ĉambron
Per verda lumo eta lampo.

Li verkis kanton -"Kanto verda",
Pri amikeco, pri la amo,
Kaj la gitar' varmigis lian
de la anim' ĉiaman flamon.

Forflugis jaroj, temp' trapasis
Li rememoris kun tenero
La tuta viv' ne estis "verda",
Sed hom' ne vivas sen espero.

Ne estis el ali-planedo,
Ne estis stranga vivekzisto,
Memorinsignojn verdajn gardas
Kun "verda" kor' Esperantisto!



Poemojn trovas ni kiel trezoron,
Aperas kiel nova la planed',

Eklumas ĉio, ĝoj' varmigas koron,
Eksunas viv', feliĉas la moment'.

Komprenas la sinjoroj, ĉar tre ofte
Antaŭ vort' belega sen envi',
Demetas la ĉapelon, sur genuoj
Kliniĝas, benas strofon de la poezi'!

Mi rakontas pri tago pasinta,
Pri veter', kiu tedis de pluvo,
Pri sopir' aŭ ĝoj' en la vivo
Kaj pri la fantazioj sen pruvo.

Pri la helpo al homoj, al bestoj,
Pri la agoj honestaj, fervoraj,
Pri afliktoj maljustaj, sensecaj
Kaj pri la akuzanta memoro.

Mi feliĉas kaj kantas la kanton
Pri matena bruet' de birdaro,
Pri karesa ektuŝo de ondoj
Ĉe senlima malhelblua maro.

Pri la noktoj sendormaj rakontas,
Pri rigard' de katid' petolema,
Mi ne trovas ĉe homoj similajn
De la amo kaj fid' sentojn plenajn.

Pri la veraj amikoj rakontas
Kiel gravas la varmo en koroj,
Ke nur vorto sincera valoras
Pli ol mono, honor' aŭ gloro.

"Vagabondas" la vers' kun demando
Ĉu silenti, ĉu laŭte paroli?
Povas skribi nenion la mano,
Sed silenti ne povas la koro.

Klara Ilutoviĉ (Rusio)

La 26-an de julio 1887

La Unua libro de l' internacia

Lingvo, proponanta vaston de liber'
En komuniĝo paca kaj racia
Kun popol' kaj homo sur la tuta ter'.

La unua paŝo al interkompreno
De diverslandanoj sen la lingva bar',
Al glorinda celo sen turmenta peno
Senti sin komforte en la lingva mar'.

La unua pordo en alian mondon
De la novaj lingvo, lumo kaj esper'
Ĉui alprenite en amikan rondon,
Komprenante ĉies dirojn sen sufer'.

La unua voko al pli riĉa vivo
Dank' al novaj fortoj de l' komunikil'.
En l' Unua libro jam en efektivo
Esperanto lumas je l' estonta bril'.



Ángel Arquillos (Hispanio)



Ĉiuj kontraŭ mi

Ĉiuj kontraŭ mi leviĝas
vidante min sendefenda,
ĉar eble, neniuj scias
kion mi vere pretendas.

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



*Kun sincera danko al ĉiuj
geamikoj, kiuj kortuŝis min per
sinceraj gratuloj kaj bondeziroj:*

Por la trikvaronarcenta naskiĝtago

La datoj de mia vivo estas por mi unikaj.
La gravajn mi ja atendas, revante ĝisvivi.
Memoras ilin parencoj kaj vi, la bonaj amikoj,
samkiel mi en la kapo gardas memoron pri vi.

Sed, damne, galopas jaroj de l'vivo tute
senbride,
hieraŭ mi havis kvindek, hodiaŭ – jam sepdek
kvin!

Mi ne ploretu pro tio, renkontu mi l' daton
ride,
ĉar ĉiu tag' donacita de l' sorto ĝojigas min.

Mi trotu plu laŭ la pado, kiun mi iam elektis,
eĉ se ĝi estas danĝera, laciga, serpente kurba.
Mi faru plu la aferojn kiujn mi mem enplektis
en revojn de mia vivo, bonŝance ja, ne tro
kurta.

Mi levu hodiaŭ glaseton kun bona vino je
bona sano
kaj la bondezirojn amikajn akceptu kun kora
danko,
ĉar ĉiam sentante subtenon de varma amika
mano,
komprenas mi, ke la viv' estus mava ĉe ties
manko.

La vivo

Novjara aranĝo.
Rigard-interŝanĝo.
Subita stultiĝo.
Interkonatiĝo.
Parolo pri l' ŝato.
Tostad'. Brudersafto.

2020

Invito. Hezito.
Anima kolito.

Bukedoj. Bombonoj.
Ofendoj. Pardonoj.
Promen'. Diskoteko.
Kunkuŝo. Kunveko.
Vojaĝo. Foiro.
Kverelo. Foriro.
Fejsbuko. Paciĝo.
Renkonto. Kuniĝo.

Ĝemeloj. Kredito.
Rutino. Kolito.
Riproĉoj. Tolerero.
Disput'. Ekkolero.
Kokrad'. Reciproko.
Kunvivo. Kunmoko.
Dum jaroj la samo.
La vivo
Novjara aranĝo.
Rigard-interŝanĝo.
Subita stultiĝo.
Interkonatiĝo.
Parolo pri l' ŝato.
Tostad'. Bruderŝafto.
Invito. Hezito.
Anima kolito.

Bukedoj. Bombonoj.
Ofendoj. Pardonoj.
Promen'. Diskoteko.
Kunkuŝo. Kunveko.
Vojaĝo. Foiro.
Kverelo. Foriro.
Fejsbuko. Paciĝo.
Renkonto. Kuniĝo.

Ĝemeloj. Kredito.
Rutino. Kolito.
Riproĉoj. Tolerero.
Disput'. Ekkolero.
Kokrad'. Reciproko.
Kunvivo. Kunmoko.

Dum jaroj la samo.
Ĉu amo?

Ĝibiĝanta enĝardene
inter ajloj, cepoj, fragoj,
loniceraj kaj brasikoj,
plure mi bedaŭras ke ne
venas pluv' dum pluraj tagoj
kaj la bedoj ĝemas sekaj.

Soifanta, ĉevespere
min sufero vokas ter', do
en ĝardenon mi impetas,
ĉar necesas dumsomere
preni hoson por aspergo -
miaj plantoj akvon petas.

Iam fajfis mi pri plantoj,
vojaĝante kun gitaro
en Eŭropo, en Azio...
Ne plu nun naskiĝas kantoj,
pene pelas jaron jaro,
ŝajnas ke ŝanĝiĝis ĉio:

ne la venkon de la lingvo,
la elvicon oni traktas
pesimisme kaj senpene,
kvazaŭ la fraŭlina lino
kontraŭ maljuniĝ' baraktas
spite la komprenon ke ne

ŝminko gravas, sed humoro
vivdeziro, optimismo,
kaj impet' al ĝusta pado...
En varmego mia koro
taksas ĉion tra la prismo
de ĝardena aspergado.

Ulrich Matthias (Germanio)



Printempa vespero 2020

Stratoj, placo forlasitaj,
el la domoj milda lum'
Mi pluiras kun medito,
kaj jen haltas kun cerbum'.

Distanciĝi devas ĉiuj,
mankas varm' de proksimul'.
Mankas, kio donas ĝojon,
kaj kun larmo en okul'

mi plu vagas el la muroj
ĝis libera horizont'.
Ĉio dormas en trankvilo,
vastas la silenta mond'.

Hejmeniri mi decidias.
Sidas mi ĉe komputil'
Kaj ĉe Vizaĝlibro vidas
fotojn de amikoj mil.

En la virtuala mondo
malpli tristas mia sort'.
Ĝuas mi amikajn sentojn,
ĝojas pri afabla vort'.

Vortoj en amata lingvo,
kantoj super lingva lim',
fotoj de amataj homoj,
filmoj el la malproksim'.

Kaj min ravas rememoroj
pri kunvenoj en pase'.
Homoj, kiujn mi renkontis,
kiujn mi ŝategis tre.

Multaj ankaŭ nun aktivas,
multaj ne forgesis min,
ili restas en la koro,
ili restas en anim'.

Super miaj songoj dolĉaj
ŝvebas iu sorĉa son'.
Kia brilo, kia belo.
Gracoplena, ĉi-sezon'.

(verkita je 23.04.2020 , inspirita de la poemo "Markt und Straßen stehn verlassen" de Joseph von Eichendorff kaj ĝia esperanta traduko de Adolf Burkhardt)

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



Papavfloroj

Sur kamparo jen papavoj floras,
rozaj kiel lipo de belino.
Ili ĉarme en zefir' fervoras,
kaj l' aromo flosas al kor-sino.

La belec' animon songĝ-obsedas,
neĝ-glacion fandas la pasio.
Tamen ili pekon jam heredas,
fonto de mania agonio.

Ruĝ-petaloj brilas kun fiero,
sed en tenta ombro makulata.
Migre inter fido kaj despero,
devojiĝo povas esti fata.

Teme pri anĝelo kaj demono,
papavfloroj flustras kun admono.

Lotusfloroj

Mi promenas preter klara lago,
lotusfloroj sorĉe jen fervoras.
En zefiro de somera tago,
ili rose kaj blankpure floras.

Verdfolioj kiel jupo de fraŭlino,
sur ondetoj svingas pimp-gracie.
Dolĉ-parfumo flosas al kor-sino,
Mi ebrias tranca nostalgie.

Lagsurfacon jen nebul' obsedas,
sur burĝono staras nun libelo.
Anim-pacon pure mi posedas,
kvazaŭ en la mondo de fabelo.

Temas pri model' de pura moro,
lotusfloroj lindas en la koro.

Noto: Lotusfloro kreskas el malpura ŝlimo sed restas pura. Laŭ la moro de lotusfloro, ni restu honestaj kaj korpuraj malgraŭ ĝenerala koruptado kaj malvirto!

Blazio Vaha (Hungario)



La taŭro kaj la kulo

Sur la kornon de la taŭro
kulo flugis, kaj post kaŭro
de pli-malpli longa daŭro
diris al la taŭr' kompleze:
"Se mi ŝarĝas vin tro peze,
kaj vi volas, ke mi iru
for de via korno, diru!"

Kaj la taŭro diris: "Ba,
ĉu vi estas alfluganta,
forfluganta, ho giganta,
mi vin ne rimarkas ja!"

Melankolia kvinminuto de hejmsidulo

Mi konas kantojn esperantajn,
prononcas vortojn esperkantajn,
sed: nepre ne tre esperas mi,
nur nepre esper-esperas mi.

Peni tro ne volas mi,
peru espereton vi,
aliaj.

Ci amas Esperanton ial.
Vi ŝatas Esperanton ial.
Ci ĝuas esperanton ial.
Ci ne tre volas scii, kial.
Ci nepre volas diri, kial.
Min ne tre interesas, kial
io min interesas, kial
cin interesas Espo, ial.,
do diru mem, ci, fine, kial,
se ci mem volas diri, ial,

ci Esperanton amas kial,
aŭ kial ci nur ŝatas ial,
aŭ eble ĝin malĝuas iam,
kiam mi ĝin tro uzas, ial,
do diru tion, se ci emas,
ja ankaŭ tion mi sciemas,
sed tio estas ne tre grava,
pri tio estas ĉiu prava.

Jadranka Miric (Serbio)



la 26 de Julio Esperanto-Tago

Esperas mi,
esperas vi
ke paco regu
en la mondo ĉi!

En Ĉinio vi ,
en Serbio mi
esperas kune ni
kun la tuta Azi` .

La espero kreskas en Ĥindio,
en la granda Rusio ,
eĉ en la varmega Afriko !
Ĉie aŭdiĝas
"Bonvenon,amiko!"

Somero

Rigardas la blankan nubon mi
kiel vigle navigas dum ĝoje
provas kapti sunbrilon laŭvoje.
Multe ĉarmas ĝi.

En sufoka aero
neniu fluganta birdo!
Ĉiu kaŝis sin en ombro branĉara.
Nur vi sur plaĝo, kara.

Freŝiga somera banado
en rivero varmete agrabla.

Vin ravis tenera korpokaresado
de milda venteto ĉe riverbordo
sabla!

Erika Godó (Hungario)



Literoj

La danco de literoj kaj vortludoj sur papero.
Kaŝitaj mesaĝoj priskribas la magion de
lingvo.

Simplaj literoj parolas pri multaj aferoj.
Ili formas penson kaj esprimas belecon.
Sen literoj, pensoj forflugus kiel birdoj.
Nova poemo ne estus farita el kirlantaj pensoj.

La vortoj skribitaj per inko brilas kiel perloj.
La vortoj povas formi signifoplenajn frazojn.
Nova mondo farita el literoj kaj strangaj
sentoj.
Tiel ili disvastigas sian mesaĝon en la mondo.
Ili estas gvidlumoj por ni sur nia vojo al scio.
Ŝvebu kun ili sur la ondoj de racio kaj emocio.

La somero

La hela lumo de somero brilas sur la pejzaĝo,
varmiga sunlumo dancas super la tero.
La herbo estas verda, la birdo pepas,
la floroj estas vestitaj per belegaj koloroj.
Estas bone ripozi en la malvarmeta ombro,
malvarmiga spiro de freŝa venteto blovas.

Flosantaj ŝafnuboj en la blua ĉielo,
brilanta spegulo de lagoj en sunlumo.
Ni ĝuu la magiajn momentojn de somero,
la ĝojaj sonoj de libereco flugas en la vento.
La ĉarmo de someraj tagoj kaj noktoj allogas
nin,
ili alportas la mesaĝon de feliĉo al niaj koroj
kaj animoj.

La tondro

La arko de lumo inter ĉielo kaj tero,
ĝia brilanta energio trapenetas ĉion.
Tondro ligas ĉielon kaj teron por
momento,
ĝi montras la potencon de la krea forto.
Ĉi tiu momento estas brila kaj bela kaj
majesta,
timiga vidaĵo, tamen tiel fascina.
La danco de fulmo en la ĉielo estas belo,
memorigas nin pri la potenco de la
naturo.

La Unua Libro

En malgranda ĉambro en junulo sidis feliĉe
kaj brilaj okuloj. Lia nomo estis Ludoviko
Zamenhof, kaj antaŭ li kuŝis revo en formo de
maldika manuskripto. La jaro estis la 26-a de
julio 1887, kaj lia koro batis kun ekscito kaj
timo. Diversaj pensoj traflugis lian menson:
Ĉu la lingvo, kiun mi kreis kun tiom da amo
kaj espero, fariĝus ponto inter homoj? Ĉu la
mondo akceptus mian vizion?

Lia mano paŝtiĝis super la paĝoj, sur kiuj
estis skribitaj simplaj vortoj kaj klaraj frazoj.
Ĉiu vorto estis kiel semo, plantita en la teron
de internacia kompreno. Li rememoris la
multajn noktojn, kiam li laboris ĝis lumo de la
mateno, polurante gramatikon kaj vortaron,
esperante, ke la lingvo faciligos komunikadon
inter diversaj nacioj. Kaj tiel, la juna
Zamenhof paŝis en la historion, ne nur kiel
kreinto de lingvo, sed ankaŭ kiel portanto de
espero, kredo, kaj la ideo, ke kompreno povas
esti atingita, se nur ni havos komunan lingvon.

Feliĉan Tagon de Esperanto!



Poeto kaj rozo

(Kun birdeta pluso)
 Promene, ĉe blanka rozo
 poet' incite deklaras:
 Kiel bela! Ĝin prikantos
 mi kiel neniŭ faras!

Samtempe grande surprizas
 lin ke pro ŝajnmiskompreno
 poiome l' blanka rozo
 ruĝiĝegas de sinĝeno .

Temas ke al ĉi roz' blanka
 (Min indulgu ĝi sed veras)
 brulas la suko, senmanka,
 eĉ se vintras aŭ someras ...

Kio !? balbute l' poeto .
 La roz' : Abomenindulo!
 Ĉesigu l' rigardon supren,
 pieden ĉiu okulo !!!

Apud li ĉifoninfano,
 malpura, en osta pozo ,
 maĉante bulon da tero,
 sama ter' de l' vigla rozo . . .

Tiaj milion-abundas ,
 kriĉe l' rozo, mortmalsatas ,
 dum vi plenmalkaŝe vante
 miaombre nur min flatas!!!

Sub tuta rabiokrizo
 la petalojn tuj ĝi prenas
 for kaj ĵetas manĝocele
 dise al kiuj pansenas . . .

La poeto sian kapon
 klinas, kune l' rozo spiras.
 Ĝemas vento. La roz' mortas.
 Kaj birdeto sin retiras

De l' arbo de kie l' scenon

tutan spektis en kvieto,
 ne sen lasi etan fekon
 sur la kapo de l' poeto .

Karlo Valentino

Jen la viv' de l' kavalira band'

En arbar' en Izartal,
 fidu min, en tiu val'
 loĝis kavalira band'
 sen timemo en la land'.

Refreno:
 Jen la viv', jen la viv', jen la viv' de l' kavalira
 band',
 jen la viv', jen la viv' de l' kavalira band'.

Mezepoka kavalir'
 estis fervestita vir'.
 Tial ofte ties sort'
 estis fulmdevena mort'...

El siteloj kaj sen fin'
 ili drinkis de la vin'
 kaj bieron ĝis la fal'
 sub la tablon en la hal'...

Kaptis iun nazkatar',
 li pro medicina rar'
 spitis al la gripkulmin',
 kraĉis, sputis sen sublim'...

Rajdis iam kavalir',
 riskis multon tiu vir'.
 Post ĉevala stumbla salt'
 flaken falis li el alt'...

Kunibert la kavalir',
 surĉevale pro inspir',
 inversrajdis al la fin'
 por ne devi turni sin...

Kaj la kavalira dam',
 Stanjo, palis eĉ pro l' am'.
 Sed, se naŭzis ŝin servist',
 ŝi flankvidis kun insist'...

Ĉiu kavalira in'
 montris senfidela sin.
 Sed ne plendis kavalir',
 kokris ŝin ja mem la vir'...

Nun la kavalira band'
 ne plu vivas en la land'.
 Nur en noktoj aŭ koŝmar'
 plu fantomas tiu ar'.

Tradukis



Hans-Georg Kaiser

(Germanio)

El la ĉina antikva poezio

Li Yu (937-978)

—*laŭ melodio Rigardo al sudlando*

Kiom da rankoro
 ja ankoraŭ restas en lastnokta sonĝo!
 Ŝajne en pasinta horo
 ni rondiris en ĝardeno reĝa:
 jen abundis la spektakla bolo
 de ĉevaloj kaj kaleŝoj en vicaro longa,
 floroj pompis en fervoro
 en printempa vento.

—*laŭ melodio Migrantaj orioletoj*

Frumatena suno sinkis,
 noktaj nuboj maldensiĝas pale.
 Mi apogas min sur kapkuseno
 muta el la sonĝo mens-malklare.
 Sobre mi ankoraŭ alkrociĝas
 al la bildo: herboj pompas reale,
 malaperas ĉe la horizonto
 la sovaĝanseroj jen flugantaj are.

Orioloj disen flugis,
 floroj falas en pelmelo.
 La profunda kort' solecas
 kiel la pentrita ĉambro en malhelo.
 Ne balau ruĝajn florojn
 kaj restigu ilin sur la tero.
 Lasu ilin kuŝi tie ĝis dancistoj
 ja revenos paŝe kun leĝero.

—*laŭ melodio Moruskolektanta knabino*

Antaŭ l' pavilono ruĝaj floroj
 ekfrapitaj de l' adiaŭanta primavero
 dance falas kun gracia pozo.
 Delikata pluvo ŝvebas kun libero
 kaj animon mian humidigas,
 mi kuntiras brovojn ĉiam de sufero.

Venas ne mesaĝ' al mia buduaro
 kun drapiraj fenestr-kurtenoj en izolo.
 Incensaĵoj brulis jam ĝis cindro
 ankaŭ mia sent' fridiĝas en la koro.
 Volas fali mi en la sonĝon
 por lin vidi ja reveni el la foro.

—*laŭ melodio Ĝojo de intervidiĝo*

Silente mi ascendas l' okcidentan turon
 sola,
 kaj vidas hoksimilan lunon kun brilhelo.
 Platanoj en soleco en la korto senrumora
 ŝlosita estas de aŭtuna trista belo.

Se tondi, sed ne disrompiĝi,
 se bonordigi, sed des implikiĝi pli
 ĝi estas la ĉagreno de disiĝo
 naskanta tristan senton de la nostalgi'.

—*laŭ melodio Serena muziko*

Printemp' duone pasis
 de kiam ni disiĝis kun doloro.
 Eĉ bela sceno vekas en mi
 ĉagrenon pikan al la koro.
 ĉe la perono amasiĝas
 falintaj umefloroj kiel blanka la neĝmolo.
 Forviŝas mi ĝin de l' perono,

sed ĝi plenkovras min kun folo.

Sovaĝanser' aflugas jen pretere,
 ĝi ne alportas mesaĝeton nun pri vi.
 Mi scias, ke vi malfacile hejmeniri
 pro longa vojo kvankam kun defi'.
 Ĉagreno de disiĝo kiel herboj en primtepo,
 antaŭen ju pli, ili kreskas pompe ja des pli.

El bronzaĵaj kaj bambuaj muzikiloj
 elŝvebas klara kaj sonora la ario.
 Sur la liuto ŝiaj delikataj fingroj
 adaĝe plektras kun kortuŝa emocio.
 Mi interŝanĝas kun ŝi okulumon
 allogan kaj kaŝitan ja de amebrio.

Ni amindumas en la buduaro,
 amsent' fariĝas inter ni en harmonio.
 Post la festeno l' novnaskita sento
 tuj malpleniĝas kiel fantazio.
 Mi ebriiĝas en ĉiela amoĝuo
 ja kvaz' en sonĝ' de iluzio.

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Skënder Rusi



Virino ridanta kun si mem

Virino, irante, kun si mem ridis,
 kaj la vizaĝo magieca fariĝis!
 Diru al mi, tian virinon,
 Kiu jam trovis.
 Esti tiel modesta
 Kaj same majosa?

Mi mensogas kiam diris
 Ŝi kun si mem ridis!
 Ene de ŝi bebo jam estis

Kiu ion serĉis!
 Ĝi piedfrapis ĉar eliri volis.
 "Panjo" ĝi alvokis,
 Sed nur ĝi tion aŭdis!

Ĉi tiu virino duoble viva estis,
 Tie sur la strato,
 Dum ŝi iradis!
 Estos knabo la naskiĝonto,
 Sed eĉ knabino ĝi estus
 Denove ŝi ridus!

Sazan Goliku



Kiam kaj kiam

Kiam la herooj per ĉifonoj sin vestas
 la ĉifonuloj herooj fariĝas.

Kiam la klera cerbo manĝas
 la postrestaĵojn de la ignoreco
 la ignoreco sin nutras kaj brilas
 per la klera cerbo kaj mortas.

Kiam la kostumo pli ol la korpo valoras
 la korpo estas proklaminta delonge
 sian nekrologon.

Kiam la Luno blindigi la Sunon provas
 La Suno ridas kaj senĉese nutras
 la delikatan Lunon, la senvivan Lunon.

Vullnet Mato



Kial ploris kaj ridis la virino senkaŭze

Ŝi neatendite ploris
 kvazaŭ ŝi infano estus.

Ŝi ploris de fojo al fojo
 sen ia komprenebla kaŭzo.

Ŝi memoris ke kun la edzo
malmulte amoradis,
kaj la larmoj spruce faladis
kvazaŭ difektita krano.

Poste, kiam li aldiris:
“Vi ne plu estas alloga,
la jaroj vian aspekton jam turnis
al malbelo!”

Ŝi rediris:
“Iru al diablo!”
kaj tutan nokton ellarmis,
ĝis la tagiĝo...

Alia viro aldiris:
“Vi estas terure bela!”
kaj ŝi neatendite
la brakojn kvazaŭ birdo malfermis.

Vespere ŝi al li donacis
kison,
kaj la korpon, kiam la edzo
kun siaj amikoj vagadis.

Poste, dum la semajnoj
ŝi senkaŭze ridis,
ridis kaj flugis
per la piedoj kaj per la manoj.

Kial ploras kaj ridas
la virino senkaŭze,
por la viroj malfacile
kompreni tion estas...

Evelina Kerciku



La preĝo de la patrino

Filo mia, al la promenejo, min konduku,
Mi ankoraŭ fortajn piedojn havas;
por ke mi preter vin kuniru

Ĉar mi neniam maljuna sentiĝas..

Filo mia, al via hejmo, min invitu,
Almenaŭ dum la dimanĉoj;
por tagmanĝo aŭ vespermanĝo,
por ke mi akompanata sentiĝu,
kaj kun vi en kompleto.

Filo mia, amece min alparolu,
ne ĉiam min kontraŭstaru.
Kaj ne incitiĝu,
ni, maljunuloj, al la infanoj similas
Por ke oni nin dorlotu, ni ŝatas
Nin ridetu, ĉirkaŭbraku...

Celebru, filo mia, miajn datrevenojn,
ne riproĉu miajn”stultaĵojn”;
kaj mi klopodos fariĝi forta kaj
mi penos elteni la malĝojojn...

Ne forigu min de via vivo, filo mia
ne alparolu min kolere;
mi ankoraŭ havas klaran menson,
ankoraŭ mi havas iamajn memorojn...

Venu viziti min en la hejmo, filo mia,
kaj mi nenion de vi postulos;
krom vian ĉeeston kaj
ame mi vian vizaĝon rigardos,
kaj homon en vi mi vidos...

Ne lasu min trista kaj soleca,
ne diru min kuŝu ĉar mi estas laca,
la kuracistoj eraras, filo mia,
la doloro ja en la Animo esats.

Elalbanigis



Bardhyl Selimi **(Albanio)**



Ĉineske

Yi Qiao (Ĉinio)

Odo al lotuso

— laŭ ĉinesko *budhista kantisto**

A

Lotuso blanka floras,
en zefiro fervoras,
sur la verda lag',
dum somera tag'.

Lagakvo klaras,
mi pace staras,
kun flora odor',
ebrias la kor'.

B

Kreskas lotus' el ŝlimo,
sed noblas la animo,
purblankas la flor',
ŝvebas bonodor'.

Kun deca moro,
puras la koro,
virton benas ni,
en pacharmoni'.

**Budhista kantisto (ĉine: pusaman):ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo*

La Herbejo

— laŭ ĉinesko *Belulino Yu**

I.

Sub ĉielo lazura
ŝafar' blankpura
kiel arĝentoflokoj
okulplaĉas sur paŝtolokoj.

Jen galopas ĉevaloj
kun madrigaloj.
Jam ebrias mia kor'
pro flosanta flora bonodor'.

II.

Ho, l' herbejo senlima
kaj malproksima
plenas de mia sopir'
al pilgrimcelo kun bondezir'.

Nuboj sur bluĉielo
tra aŭrorhelo.
Susuras la freŝa vent'
kun tenera nostalgia sent'.

**Belulino Yu (ĉine: Yumeiren) ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 7,5; 7,9; / 7,5;7,9; silaboj kun para rimo.*

Jadranka Miric (Serbio)

Someraj pluvoj

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo**

Frekventas
someraj ŝtormoj.
Ĉi-jare danĝeroj tro
abundas. Jam grandaj
okazis damaĝoj.

Someraj
pluvegoj ofte
venas post varmega tag'.
Pluvo neatendite
surprizas alte.

Infanoj
senpacience
atendas sunan varmon.
Ni solas iasence,
ploras knabece.

Varmetaj
tagoj ariĝis.
La nubetoj arĝente,
sur ĉiel', koloriĝis.

